



mx

Junio 1986

Numero 2 Číslo

Červen 1986

mx

La VIA printempa seminario en Mn.Hradiště okazis en la tagoj de 25 ĝis 27an de aprilo 1986. Partoprenis en ĝi 72 esperantistoj, pliparte komencanto, por kiu la paroliga seminario estis distinita. Plimulto el ili havis okazon unuan fojon aŭskulti vivan esperantan lingvon kaj por la komencantoj estis ankaŭ distinitaj konsiloj de pli spertaj, de kiuj ili eksciis kiel progresi en la studado, kiel gajni internaciajn kontaktojn, kia estas la organiza strukturo kaj stato de nia movado kaj aliajn informojn. Malgranda libra kaj gazeta bazaro helpis gajni literaturon. Bedaŭrinde ni povis havigi nur 72 litojn, kvankam la intereso pri la seminario estis pli granda. Montriĝis multaj novaj talentoj pri kiuj ni baldaŭ aŭdos. Ni bedaŭras, ke ne estas eble entrepreni pli multajn renkontiĝojn kun amuza programo, kiu helpus firmigi niajn vicojn. La amuza programo konsistis el ekskurso (kies manko estis neplenumita itinero pro portempa perdo de unu el la partoprenintoj) kaj kultura vespero dum kiu prezentis nia ŝatata Eva Seemanová scenan monologon Elizabeta el Bela Monto, ligan al serio de prezentado de unuaj verkistinoj de la tempoperiodo de ĉeĥa nacia renezanco.

VI. jarní esperantský seminář v Mn.Hradišti byl organizován 25.-27.dubna 1986. Účastnilo se ho 72 esperantistů, většinou začátečnicků, pro něž tento „rozmlouvací“ seminář byl určen. Většina měla poprvé možnost vyslechnout živý esperantský jazyk a začátečnickům byly také určeny rady zkušenějších esperantistů od nichž se dozvěděli, jak pokračovat ve studiu, jak získat mezinárodní kontakty, jaká je organizační struktura a stav našeho hnutí a jiné informace. Malý bazar knih a časopisů pomohl získat literaturu. Bohužel byli jsme schopni zajistit jen 72 lůžek, ačkoliv zájem o seminář byl větší. Ukázalo se mnoho nových talentů, o kterých v našem hnutí brzy uslyšíme. Litujeme, že není možné podniknout více takových setkání se zábavným programem, který by pomohl zpevnit naše řady. Zábavný program sestával z výletu (jehož nedostatkem byl nesplněný cestovní program pro dočasnou ztrátu jednoho z účastníků) a kulturní večera, během kterého představila nám oblíbená Eva Seemanová scénický monolog Alžběta z Krásné Hory, navazující na serii představení prvních spisovatelek českého národního obrození.

Regis kora atmosfero, karakterizata per ligo de multaj novaj amikaj rilatoj. Kvankam la kultura vespero okazis intence en Mladá Boleslav, por vekoj dormantaj esperantistoj de tiu ĉi urbo kun pasinta esperanta tradicio, venis el la urbo kelkaj malnovaj samideanoj. La seminario montris intereson de esperanta publiko pri similaj aranĝoj kaj ni esperas, ke nia asocio trovos eblon aranĝi seminariojn por lingva plibonigo de kaj komencintaj kaj progresintaj lernantoj.

Pluaj novaj finstudintoj de la baza korespondakurso – grupo de Dro Hradil:

Vonásek Jiří
Babincová Jitka
Pecák Václav
Hrubá Stanislava
Slámová Heliodora
Kletečková Miroslava
Třísková Irena
Forejtová Anna

Ni deziras al ili multajn sukcesojn en ilia nova esperanta vivo!

Kantoj de svisa esperanta kantisto Olivier Tzaut ĉirkaŭflugis la mondon. Ili havas ĉie grandan sukceson, estante grupe kantataj en esperantaj rondetoj. Temas pri popolkantoj el la tuta mondo (ankaŭ nia Dancu, dancu enhaviĝas). Vi povas pruntpreni sonbendon kun ili, se vi ne havas eblon aĉeti gramofondiskojn (2) ĉe nia magnetofona servo Filip Josef, 76811 Chropyně, Nádražní 146.

Olivier Tzaut sendis al ni plenajn tekstojn en naciaj lingvoj kaj en esperanto. Kvankam la elparolo de la kantoj estas tre klara, ni povas sendi al vi la tekstojn de la elektitaj kantoj. Kantigu viajn kunvenojn!

EK MH 45/86

Panovala srdečna atmosféra, karakterizovaná navázáním mnohých přátelství. Ačkoliv kulturní večer byl úmyslně v Mladé Boleslavě pro probuzení spících esperantistů tohoto města s dávnou esperantskou tradicí, přišlo z města jen několik starých samideánů. Seminář ukázal zájem esperantského publika o podobné podnniky a věříme, že náš svaz najde možnost pořádat semináře i začátečních i pokročilých žáků.

Další noví absolventi základního korespondentního kursu – skupina Dr Hradila:

Mlečice
Turnov
Praha
Praha
Kadaň
Nepolisy
Praha
Poděbrady

Přejeme jim mnoho úspěchů v jejich novém esperantském životě!

Písně švýcarského esperantského zpěváka Oliviera Tzauta obletěly svět. Jsou zpívány hromadně v esp.klubech a mají velký úspěch. Jde o lidové písně z celého světa (také naše Tancuj, tancuj). Můžete si vypůjčit s nimi magnetofonovou pásku, jestliže nemáte možnost koupit si gramofonové desky, u naší magnetofonové služby, Josef Filip, 76811 Chropyně, Nádražní 146. Olivier Tzaut poslal nám plné texty v národních jazycích i esperantu. Ačkoliv výslovnost je velmi zřetelná, můžeme Vám poslat texty vybraných písní. Rozezpívejte Vaše schůzky!

Esperantujo. S-ano Rudolf Pleskot atentigis nin, ke vere ekzistas „Esperantujo-centro de laboro, kulturo kaj feriado“ I-37010 Kavalcaselle (Verona) tel. (045)641528. Ĝi situas oriente de Lago di Garda (370km²) kaj urbo Peschiera nordorienta de la urbo Verona.

Gramatikaĵoj – elekto el Kaloscay: Lingvo-stiloformo – estis multobligitaj okaze de nia seminario. (16p.) - restis kelkaj ekzempleroj haveblaj kontraŭ sedo de 8 Kčs en poŝtmarkoj.

Esperantujo. S-ano Rudolf Pleskot upozornil nias, že skutečně existuje „Esperantujo-středisko práce, kultury a odpočinku“ I-37010 Kavalcaselle (Verona) tel. (045)641528. Nalézá se východně od Lago di Garde (370km²) a města Peschiera severovýchodně od města Verona.

Gramatické poznámky – výběr z Kaloscaye: Jazyk, styl-forma byly vytištěny k našemu semináři (16str) – zůstalo několik exemplářů k dostání za Kč 8 ve známkách.

Repliko de D-ro Erich-Dieter Krause, Semmelwesstr.7, DDR-7010 (Koncernas la noton de s-ano Karel Blažek en Verda Familio 2/1985 – neologismoj en la germana-esperanta vortaro):

S-ro Blažek tute pravas rimarkante, ke kelkaj el la Esperanto-vortoj en mia poŝvortaro Esperanto-germana (kiu estis unuafoje eldonita en la jaro 1967) ne koincidas kun vortformoj menciitaj en “Plena Ilustrita Vortaro” (kiu eliris en 1970, do tri jarojn post mia vortareto). Kelkaj E-vortoj eĉ ne estas registritaj en PIV. Mi donas, ĉi-sekve, kelkajn klarigojn:

gravel/o = gruz/o. Tamen la unue nomita vorto estas ofte travebla en faka literaturo.

ig/e Temas pri vorto derivita de la sufikso -ig-, kiu estas fakte kaj tute logike uzata kiel memstara adverbo. La „Plena vortaro de Esperanto“ (Parizo 1956) listigas tiun ĉi formon kaj klarigas ĝin sur la paĝo 1985 jene: „Adverbo signifanta la kaŭzecon kaj montranta la aganton“ kaj donas la jenajn ekzemplofrasojn: ĉio okazis ige de tiu virino; malvenko de Hanibalo ige de Scipiono; la fondo de Romo ige de Romulo. (Komparu: age de, fare de). El tio vidiĝas, ke tiu ĉi formo nepre akcepteblas. Mi persone trovis ĝin ege taŭge, des pli ĉar estas ja konciza.

meringel/o – Ankaŭ tiu ĉi formo troviĝas en PV, Waringhien tamen poste ŝanĝis, t.e. mallongigis ĝin en al meringo (tiel proveblas en PIV). La kaŭzo por tiu ĉi ŝanĝo certe estas iel nekomprenebla. Pro tio la Esperanta-rusa vortaro mencias sur paĝo 284: mering/el/o. Ĉu tio estas la solvo?

prest/i – Trovebla, kvankam nek en PIV nek en PV, en tekstoj de jurscienco.

sermon/o – Estas varianto de „prediko“, nome tiu ĉi vorto entenas malŝatan nuancon, kvalifikas la predikon aŭ simple la diritaĵojn kiel monotona, enuiga. Tiel ankaŭ la metafora signifo, ankaŭ menciita en mia poŝvortaro: (germanlingve) langweilige Rede.

smugl/i = kontrabandi. La prioritaton havas nepre la formo „kontrabandi“, kiu ankaŭ enteniĝas en la vortaro, sur paĝo 98. Tamen vortaro devas, en la parto Esperanto-nacilingva, doni ankaŭ variantojn (ne estas tiel en la parto nacilingva-Esperanta, ĉar tiukaze li rekomendas), ĉar la leganto de Esperanto teksto, trafante sur iun tian esprimon ja volas ekscii kion ĝi signifas, eĉ se la formo (ekz. „smugli“) estas malofta.

spul/o = bobeno. Vidu ĉi supre.

sultr/a Bonveninda neologismo! Ĝi fakte ne ekvivalentas, kiel diras s-ro Blažek, al „varmego, sufoka“. La nova vorto devenas de la angla (sultry) kaj signifas – tiel ankaŭ en Esperanto!--: sufoke (aŭ preme) varmego; en metafora senco: arda, ekzemple „sultra temperamento“ kaj due ankaŭ en ot/ig/a, ekz. sultra voĉo

turfo – estas pli ofte uzata formo ol la arkaiĝanta „hipodromo“, kvankam PIV donas prioritaton al ĉi-lastata.

turg/a kaj turg/eco – ambaŭ estas nepre pli taŭgaj formoj ol PIV-aj turgesk/o kaj turgor/o (komparu en PIV, p.1147), ĉar kiel el ili formi la adjektivon? Cetere ne temas pri ŝvelo (tiel s-ro Blažek), sed pri ŝvelo de la histo kaŭze de prepleno de sango aŭ korposukoj k.s.

tvirn/o – nepre bonvena neologismo, ankaŭ uzota de Rüdiger Eichholz en lia Bilderduden en Esperanto. La diferenco al „fadeno“ (do ne sinonimo) estas klare ekkonebla el la sekva klarigo: TVIRN/O = el du aŭ pli da spinaĵoj tordita firma fadeno; specoj: brodtvirno, ornama tvirno, stebtvirno.

vimpl/o – oni ne povus anstataŭigi, laŭplaĉe, tiun ĉi novan vorton en Esperanto per 1) flagrubando – aŭ 2) koinoflago. Nepre ĝi ne ekvivalentas al „flago“. Vimplo estas unu speco de flago!

Mi esperas, ke per miaj ĉi-supraj aldonoj mi portis iom da lumo en la aferon. Leksikografio, ankaŭ se temas pri Esperanto, estas fakte serioza afero kaj la moderna evoluo ja simple postulas, ke ankaŭ la vortotrezoro de Esperanto estu evoluigata. Samideanajn salutojn, sincere: Dro Ed.Krause.

Aldono de la redaktoro: Karaj legantoj – kuraĝu kaj skribu, ĉu vi sentas bezonon enkonduki la supre menciitajn neologismojn.

GRAVA KUNSIDO okazis la 21-an de marto en Prago:

Inter ĉeĥaj lingvistoj de la filozofia fakultato (kiuj estis invititaj) kaj kelkaj spertuloj el niaj vicoj. Nia celo estis informi seriozajn lingvistojn pri samtempa stato de la interlingvistikaj problemoj kaj pri la stato de nia movado, kies pozicio estas rekonata en la tuta mondo. La interparolo montris, kial malmulte estas la filologoj pri Eo informitaj. Skalička antaŭ 30 jaroj rifuzis (kaj rifuzigis) Eon pro „kosmopoliteco“ ktp. Nun li elstaris (jam maljuna homo) kaj memkritike proklamis, ke li tiam citis Liebermann-on kaj ke liaj duboj ne plenumiĝis, ke E-o vivas, havas sian literaturon, sian taskon en interhomaj kaj interkulturaj kontaktoj. Niaj reprezentantoj parolis pri universaleco de la lingvo, lingva stilistiko kaj ebloj de la lingvo ne nur teme vortfarado, sed ankaŭ pri pliriĉeco de lingvo, pri diversaj nesolvitaj problemoj, pri lernolibroj ktp. Tamen la sciencistoj interesiĝis antaŭ ĉio pri serioza „vere scienca pritakso“ de la lingvo, kiu en ĉeĥa literaturo mankas. Ekzemple ili riproĉis al Dro Zamenhof nesufiĉan difinon rilate prononcon: „Jes, oni prononcas, kiel skribas, sed kiel?“

DŮLEŽITÁ SCHŮZKA byla 21.března v Praze mezi českými lingvisty filozofické fakulty (kteří byli pozváni) a některými zkušenými odborníky z našich řad. Naším cílem bylo informovat seriózní lingvisty o současném stavu našeho hnutí, jehož postavení je uznáváno v celém světě. Diskuse ukázala, jak málo jsou lingvisté informováni o E-u. Prof. Skalička před 30 lety odmítnul (a učinil odmítnutým) E-o pro „kosmopolitismus“ atd. Nyní vystoupil (už starý člověk) a sebekriticky prohlásil, že tehdy citoval Liebermanna a že jeho obavy se nespĺnily, že E-o žije, má svou literaturu, svoji úlohu v mezilidských a mezikulturních vztazích (stycích). Naši reprezentanti hovořili o universálnosti jazyka, jazykové stylistice, a možnostech jazyka nejen co se týče tvorby slov, ale také o bohatosti jazyka, o mnoho nerozřešených problémech, učebnicích atd. Přesto se vědci zajímali především o seriózní „skutečně vědecké ohodnocení“ jazyka, které v české literatuře chybí. Někteří z nich vyčítali Dr Zamenhofovi nedostatečnou definici výslovnosti: „Ano, vyslovuje se, jak je napsáno, ale jak?“

Ĉiu rigardas ĉi tiun grandan eventon laŭ siaj propraj ekkonoj kaj imagoj. Al iu el ili ĝi tute ne plenumis liajn imagojn, al la alia ĝi plenumis ilin riĉe. Tamen entute ĉiuj pritaksis la sesion sufiĉe impono por la ambaŭflanka informado. Ili nome ekkonis, ke E-o estis ĝis nun por niaj lingvaj sciencistoj tute nekonata tereno.

La sesio estis oficiale pritaksata dum la aprila kunveno de nia artiliteratura sekcio. Pri la traktado estis sendita far de s-ano Mařík detala raporto al Heroldo. Estis decidite forigi la mankon de neinformado de sciencistoj-lingvistoj pri scienca bazo kaj strukturo de E-o, plej bone per ellaborado de certaj tezoj aŭ traduko de la libro de Wells: „Lingvistikaj aspektoj de E-o“ en ĉeĥan lingvon. Ni jam antaŭe ĝojas, ke finfine okaze la jubilea jaro la seriozaj lingvistoj povos esti serioze informitaj pri nia lingvo el scienca interlingvistika rigardo.

Každý hledí na tuto velkou událost dle vlastních poznatků a představ. Některému z nich zcela nesplnila jeho představy, jinému je splnila bohatě. Přesto celkem všichni ohodnotili sezení dostatečně imponující pro oboustrannou informaci. Poznali totiž, že E-o bylo naším jazykoznačcům až dosud zcela neznámým terénem.

Sezení bylo oficiálně hodnoceno v dubnové schůzce naší literární sekce. Podrobná zpráva o jednání byla odeslána s-aniem Maříkem do Herolda. Bylo rozhodnuto odstranit nedostatečnou informovanost našich jazykoznačců o vědecké bázi a struktuře E-a, nejlépe vypracováním určitých tezí anebo překladem knihy Wells-e: „Lingvistikaj aspektoj de E-o“ do českého jazyka. Již předem se těšíme, že konečně k jubilejnímu roku seriózní lingvisté budou moci být seriózně informováni o našem jazykovědeckém interlingv. názoru.

En la letero de Csaplar Lajos, Pács-Hird, Zámor ut.2 H-7693: Ni organizis en nia vilaĝo popolartan Esperanto-grupon. Ni faras brodaĵekspoziciojn du esperantistaj aranĝoj. Mi estas la grupoprezidanto kaj alvokas la esperantistoj, ke ili okaze la centjara datreveno organizu popolartajn grupojn. Tiel prezentu la Esperanto Movado la kulturon de la popoloj, tiel fartigu la amikecon kaj la pacon inter la popoloj!

Sa-ano Bombionka Antonín el Ostrava Poruba petis publikigi tradukon de tre interesa parto de la libro „Ognem i slovom – Per fajro kaj vorto“, kiun sendis al s-ano Andris Natinj el Petropavlovsk-Kamĉatskij: Kelkaj partoj de la libro temas pri la heroismo de gvardia kapitano J.V.Tureček, kiu estis slovakdevena, hejmiĝis kun sia familio en Ukraino, studis en altlernejo kaj poste instruis historion. En granda patriota milito li batalis en ukraina fronto. La 18an de aŭgusto 1942 kontaktis lia regimento novajn alivestitajn soldatojn de la malamiko, pri kiuj la skoltoj konstatis, ke tio estas freŝaj regimentoj de slovakoj. Majoro Tureček kun du skoltoj aŭdace trairis la frontan linion kaj kontaktis kun slovakoj. Dum traktado estis alvokita majoro Timoŝenko, stabestro rusa regimento. La oficiroj interkonsentis, ke slovakoj transiros al la rusa flanko. Per helpo de Tureček la gvardia majoro Timoŝenko kun slovakaj oficiroj decidis pri komunaj bataloj. Kaj la slovakaj kaj sovetaj kanonoj komencis pripafadon de germanaj militunuoj, kiuj estis malantaŭ la fronto. Per tio ĉi ili devigis faŝistojn forkuri el Miĥajlovka kaj baldaŭ ankaŭ el Askanija-Nova. La slovaka bataliono plenkosiste transiris al la flanko de Ruĝa Armeo. Sur placo en centro de Miĥajlovka elkreskis piramidoj da fusiloj, amasoj de grenadoj, ŝarĝo kaj ankaŭ de la ekiparo. Same estis transportitaj ĉi tien kanonoj, minĵetiloj, mitraletoj kun municio.

Komenciĝis vigla interparolo inter sovetaĵ batalantoj kaj slovakaj soldatoj, suboficiroj kaj oficiroj. Precipe helpis, ke gvardia kapitano Tureček parolis slovakan lingvon. Viktor Janoviĉ Tureček en siaj rememoraĵoj skribas: „Ne eblis disiĝi de slovakoj. Ja antaŭe al ili viva vorto de bolŝevika vero ne estis aŭdebla. Kaj nun tie ĉi soveta oficiro, politika funkciulo, parolas en ilia gepatra lingvo. Ŝajnis, ke la demandoj ne venos fino. La soldatojn ĉio interesis. Precipe ili interesiĝis pri kolonelo Ludvík Svoboda, pri lia brigado, batalanta kune kun Ruĝa armeo...“

Por handikapuloj. Letero de S.K.: Kial la sufero? (utrpení) Mi malsaniĝis per miopatio (svalové onemocnění) en la oka jaro de mia vivo. Certe ĉiu al ni (handikapuloj – noto de la red.) kiu estas jam ek de sia junaĝo malsana eksentis en si tiajn multajn malfacilaĵojn, problemojn kaj suferojn, kiuj lin dum la malsano akompanadis (doprovázely), ke li dum sia maturiĝado (dospívání) komencis al si mezi demandojn: Kial ĝuste mi? Kion mi kulpis (zavinil), ke mi ne povas esti sana kiel aliaj? Por kio mi estas en la mondo? Por kio mi estas necesa? Ĉu tio havas ian sencon (smysl) aŭ estus pli konvene (vhodné) ĉion fini? - Ĉu ĝi estis tiamaniere? Certe la pliparto konsentos, ke ĝi tiamaniere iam sentis. Kaj la jaroj flugis (letěly). Venis sopiroj (touhy) ravoĵ (sny) kaj planoj, kiuj tamen pro nevenkebla baro – miopatio – devas ruiniĝi. Kial ofte ni sentiĝis solaj eĉ meze de niaj plej proksimaj, kiuj estis rilate al mi plenaj de volonto kaj respektemo. Sed ekstaras la demando: Kaj kiel estos, se ili jam ne plu vivos, kiu restos al mi? Kiun ni amos, kiu amos nin? La koro de ĉiu homo sopiras pri la amo. Tio estas nature, ĝi sopiras (touží) ami kaj esti amata. Ĝi ne povas resti malplena kaj malvarma, ĝi sopiras pri pleniĝo (naplnění). Kaj nun ni tuŝas la problemon Estas homoj, kiuj deziras nek aŭdi pri la sufero. Sed estas ankaŭ tiaj, kiuj komprenas, ke la sufero havas en la vivo sian sencon (smysl), ke ĝi purigas, fortigas (posiluje) kaj gvidas (vede) al pli granda amo. Rememoriĝu nur, kiom da senmortaj (nesmrtelných) kaj belegaj verkoj ekestis (vzniklo) el la sufero de ekzemple (příkladně) Beethoven, Michalenĝelo, Remarque kaj multaj aliaj. Estas homoj kiuj ne petas (prosí), por ke ili suferu malmulte, sed ili prenas suferon sur si eĉ anstataŭ aliaj (ekzemple donacantoj-dárci - de reno -ledviny kaj aliaj – noto de la red.), ĝi estas tiuj, por kiuj la suferon ili taksas profitdona, pliriĉiganta. Ni, kiuj nian suferon ne elektis (nevyvolili), sed ĝi estis al ni donita, klopodu eluzi ĝin por prospero de ni mem kaj de aliaj, por ke eĉ unu horo de ilia vivo ne estu vana. Ni pruvos, ke ni gajni ne perdi (ztratit). Kaj kiu la problemon tiamaniere komprenas (chápe), ties (toho) vivo pleniĝos per riĉeco kaj amo.

ALVOKO por ĉiuj kiuj deziras helpi al tradukaj taskoj en venontaj jaroj: Se vi trovos interesan tekston en la ĉeĥa lingvo diversfakan aŭ amuzan, historian, popularsciencan, rakontojn, propraj travivaĵojn – por la grupo P (progresintoj) aŭ legante esperantajn tekstojn, librojn, gazetojn, mallongan tekston por la grupo K/P, kiuj tradukas el Eo ĉeĥlingvan kaj fine por la grupo K (komencantoj) esperantajn tekstojn tre facilajn, sed interesajn. La proponoj estu maksimume sur 1 paĝo de formato A4 dense maŝinskribite, maksimume, se oni ne povos ĝin mallongigi, 2 paĝojn. Sendu al gvidanto de tradukaj taskoj Zdeněk Řezáč, Šumburk nad Desnou, Vítězná 355, 46841 Tanvald.

TURISMO – SPORTO POR HANDIKAPULOJ. Paŝado estas la plej natura movo de la homo kaj ankaŭ handikapuloj devas uzi ĝin por refreŝigi sian korpon. Ili estas organizataj en la asocio de handikapuloj, ĉe kiu kreiĝas sekcio de esperantistoj. Movo en la freŝa aero de libera naturo, sportaj konkursoj, devas nenium troŝarĝi, malutili al lia sanstato. Pro tio ekzistas sporta sana klasifikado. Se la handikapulo okupas sin per sporta turismo, li havas eblon eĉ gajni iun sportan efikecan klason III, II, I ĝis la majstran. Ĉiu grupo havas antaŭe certigitan nombron kilometroj kaj havas sian koloron. En julio okazos tutŝtata renkonto de handikapitaj sportuloj en Gottwaldov. Detalajn informojn sendos al la interesuloj instruktore de turismo de la IIIa klaso Petera Josef, 50352 Skřivany 44.

Aktiveco de la junulara sekcio: ĝi proponas kunlaboron kun aliaj sekcioj de ĈEA dum aranĝo de kunaj agadoj (diversaj renkontiĝoj, seminarioj) en sfero de organizita preparo de kadraj rezervoj por diversaj funkcioj. Efikomplena estas jam kunlaboro en Pedagogia sekcio, konkrete kun aranĝota seminario en Lančov (27.-29.VI.1986) por junaj instruistoj. Oni traktas pri kunlaboro kun Scienc-teknika sekcio, kunlaboro en faka terminologio ktp. Informoj donos Zdeněk Mrkvica, vicestro, 63700 Brno, Sosnová 15.

Pardonpeto: En VF ni anoncis erare la novan serion de popularsciencaj artikoloj de Ing Zdeněk Pluhař en la bulteno SANO sub titolo „Homo kaj vivmedio“. Ili traktos nur ĥemiajn agencojn en la vivmedio efikantajn sur la homan sanon kaj la ĝusta titolo estas „Ĥemiizo de la vivmedio kaj la homa sano“. Ni pardonpetas la aŭtoron.

LENTAIGNE: Praktika esperanta frazeologio. Daŭrigo (pokračování):

BOVO: bovino havanta ventron ŝvelintan de gasoj (nafouklá). Melki (dojit) la mamajn de bovino. Brulstampi (vypalovat cejch). Rigardaĉi kiel bovido. Ekstaŭro (kastrita). Taŭrobatalo. Torei (batali en cirko kontraŭ taŭro). Toreadoro (toreisto, matadoro). Areno, Furioza taŭro. ĈEVALO: henas (rže, řehtá), baŭmas (vzpíná se), prancas (hrabe), kalcitras (vyhazuje), stamfas (brave batas la grundon per la piedoj), karakolas (faras fantaziajn turniĝojn kaj saltojn), kapriolas (saltas en alta lernejo; kalcitras = batas per la postaj piedoj, levante sin sur la antaŭajn; hufobatas), trotras (klusá), hot! (=hyjé!), galopas, amblas (levas samtempe la du piedojn de la sama flanko), streĉas la orelojn, snufas (frká), virĉevalo (=stalono), eksvirĉevalo, ĉevalo arda, fajra, beja (ryzák), piga (poník), ruana (šemík), strigli (hřebelcovat), jungi, turni, piki per sprono, konduki per kolbrido (uzda), trotigi, instigi per vipo (bič), ĝi deĵetas sian rajdanton, desalti. Brido (kaprimenoj, mordaĵo, kondukilo, kolrida, surdorigi selon, piedingo (třmen), kur- rajd- sel-. Tirĉevalo; hino (ĉevalo+azenino), mulo (azeno+ĉevalino), paterno (koňský nárt), fanono (ochlupacená zadní část nártu), hufo, hufumo hufferi, hipofagio (=ĉevalmanĝado), hipofagia viandejo ... Rajdi sur ĉevalo, oni ne lernas sen falo. Al ĉevalo donacita dentojn ne esploru.

Korespondi deziras: Freŝdatajn (ĉerstvé) adresojn el la tuta mondo vi trovos ankaŭ en Libereca Informilo, Internacia koresponda adresaro, eldonas: Esperanta-klubo, Poŝt-bokso 194, CS 46001 Liberec, Ĉeĥoslovakio.

Mallongiloj: bk=bildkartoj, ĉl=ĉiu lando, ĉt=ĉiu temo, dez=deziras, iŝ=interŝanĝas, its=interesiĝas, j=jaroj; kol=kolektas, kor=korespondi, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, s-ro=sinjoro, tm=tuta mondo.

Ruben Casingena, 85, Guze D'Amato Str., Paola, Malta-Eŭropo, knabo, pri ĉt, ĉl

Josef Kožišek, Jihlava 1, Žižkova 44, 48601, iŝ pm, bk, gazetojn. Certe resp.

Esperantistoj el ĥemia uzino de urbo Stara Zagora serĉas korespondamikojn. Skribu al Kristina Petkova, 6000 Zagora, N.Nikolov xxxxxxxxxx Nro 73, Bulgario (35j inĝenierino).

S-ro Luc Feidangai, Prof. d'Allemand, Lycée Technique, B.P.960, Bangui Centrafrika Respubliko, 30j gimnazia profesoro dez kor.

Roman Kubczyk, Skrytka 449, PL-42-217 Czestochowa, Pollando, iŝ filatelajojn.

28j Instruisto de franca lingvo dez kor kun komencantoj. Aleksandr L.Gluŝkov, II.kvartal, d.61. kv.1, SU-665680 Źeleznogorsk Ilimskij, Jakutskaja obl. USSR.

ELEMANI Mohamend-W.G.C.Complexe 61, Clapet 41, 46ème Arr.Mansor III, Cité Bernoussi, Casablanc, Cedex 5, Maroko, 23j junulo dez kor kun junulinoj.

La Kooperativa Esperanto-Komisiono alvokaj tutmonde ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la kooperativa agado skribi al la adreso: KEK, Budapest, Szabaság tér 14, H-10540SZT, Hungario. Ili ankaŭ zorgos pri korespondpartnero. Al la interesiĝantoj estos regule sendata periodaĵo Kooperativa Stelo. Ede AGOTAI, Kossth u.1/52 *Újszasz*-5052, Hungario, 41j vojaĝema edzo kun 2 filoj kol bk kaj landkartojn tm.

Csaba Székely, Zsivánovics u.8 fsz.2, H-6500 Baja, Hungario kol bk pri hundoj.

Zulia Esperanto-Asocio, vegetarana sekcio, Calle 79 No 3C-72, Maracaibo 4002, Venezuelo, dez kor kun vegetaranoj.

Lucyna MALARZ, ul.Sportowa 33m31, PL 26-600 RADOM, Pollando 26j inĝenierino kol gramodiskojn.

Kunlaboru kun PASPORTA SERVO de tutmonda eso.junulara organizo, gastigu senpage esperantistojn kaj mem uzo tiun avantaĝon, gastante ĉe pli ol 700 gastigantoj en 53 landoj de la mondo. Landa organizanto por Ĉeĥoslovakio estas V.K.Baranovská, PhDr, K.H.Máchy 3, 79201 Bruntál.

Atanas GVILDYS, Revoliuiojios 21-19, SU-234430, Jurbakas, 23j fraŭlo kor tm pri lingvoj, literaturo, m.

Esperantista Sporta Klubo (D.D.J.S.) 26 Rue de la Baisse, F-69625 Villeŭrbanne-Cédex, Francio kontaktas kun sportemuloj. Skribu vian nomon kaj *personajn* datojn, vi ricevados informojn.alerio Valerio VORONIN, ul.Ĉapajeva 12-902, SU-69022 Vladivostok, 331 fraŭlo laboristo kor pri vivmanieroj kaj *lensmanieroj* de la eksterlandanoj.

Mehmet Telyakar, Aydirlik Sokak 23, Ortaköy, Istanbul, Turkio, iŝ pm.

xmxmxmxmxmxmx

xmxmxmxmxmx

xmxmxmxmx

xmxmxmx

xmxmx

xmx

x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Presaĵo

EK MH 51/86